



Numero 2024:20; majo 17.

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo : LAPA MONA. 799 KB.. Sume1099 KB

La trilingva bulteno de UEA informadas vaste

UN-bulteno: numero 70

- Universala Esperanto-Asocio emfazas lingvajn rajtojn en sia mesaĝo okaze de la Internacia Tago de Familioj, la 15-an de majo 2024.
- Aruŝa: Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo.
- UEA bonvenigas strategian raporton de UN pri multlingvismo.
- UEA-delegitoj survojas al Najrobio.
- La venontmonata simpozio pri lingvoj kaj UN pretiĝas.

Junia simpozio pri lingvoj kaj UN pretiĝas

Preparoj nun kompletiĝas por la ĉi-jara Simpozio pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazos virtuale la 10-an kaj 11-an de junio. La simpozio, ĉiujara aranĝo kiu kunvenigas UN-stabanojn, lingvo-profesiulojn, edukistojn, fakulojn, diplomatojn kaj anojn de la civila socio, okazadas regule jam de multaj jaroj. Organizas ĝin komitato kun bazo en Novjorko, kies membroj estas Prof. Francis M. Hult (Profesoro pri Edukado, University of Maryland Baltimore County), D-ro Carol Benson (MLE International), Prof. Lisa McEntee-Atalianis (Profesorino pri Socilingvistiko, Birkbeck University of London), Rosemary Salomone (Profesoro pri Juro, St. John's University), kaj Humphrey Tonkin (Emerita Prezidanto, University of Hartford). Legu ĉe: fmhult@umbc.edu. La konferencon aŭspicias la Komitato de Neregistaraj Organizoj de la Konferenco de Organizoj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO).

Virina agado en porvirina liceo en Benino

Dissendiĝis la unua raporto, kiu fokusiĝis pri la unua kurskunveno okazinta la 1-an de marto 2024 en Lokossa. La nuna raporto pritraktas kursojn estroitaĵajn la postajn vendredojn. En la unua kurskunveno, la tuta lernantaro vizitis la kurson sammomente en la sama klasĉambro rezervita por Esperanto. La junularo estas disdividita en du grupojn ekde la dua kurskunveno. La du subgrupoj lernas malsamhore sed evoluis samnivele. La 8-an de marto 2024, la junularo finstudis la alfabeton per silaba kaj vorta elparolado aldone al ĝeneralaj reguloj pri Esperanto. Tiel, ili ekscias, ke en Esperanto, la skribado estas fonetika. Ili lernis pri la uzo de la definitiva artikolo kaj salutvortoj, poste ili enfokusigis personajn pronomojn kaj posedajn adjektivojn. Donou Menelik, instruanto helpis gvidi la kursojn.

Koncizigo de teksto de Latifou Gbadamassi

Valora kursa materialo pri Interlingvistiko

La prezentoj de Ahmad Mamduhi kaj aliaj materialoj estas videblaj en https://uea.org/vikio/Materialoj_por_la_studentoj_-_Interlingvistiko

Ahmad Mamduhi kaj Renato Corsetti.

Zamenhofaj memorejoj en Hungario



Alvenis en Hungario bildoj de Zamenhofaj Esperanto-objektoj (ZEO). Tiuj helpas memori ni pri nia propra historio. Laŭ deklaroj, ekde la kolektado de informoj, 124 personoj registris 287 vizitojn al ZEO-j.

La rezultoj videblas ĉe <http://www.eszperanto.hu/zeo-hu/>

László Szilvasi (surfote kun monumentoj)

Fervojistoj agis en Strasburgo

En la Eŭropa Esperanto-Kongreso, agis niaj fervojistoj. Por IFEF Bruno Henry trovis eblon por speciala faka vizito en ripara kaj bonteniga centralo de SNCF proksima al la ĉefstacio de Strasburgo.

Guido Brandenburg, IFEF en Germanio

Limburga invito septembre

Vi estas bonvenaj al la Beneluksa Kongreso 2024 en Hasselt, Belgio. Ĝi estas organizita de LEA (Limburga Esperanto-Asocio). Datoj: inter la 20-a kaj 22-a de septembro. Ni loĝos en tre moderna junular-gastejo apud la stacidomo en Hasselt. La programo konsistas el interkona vespero, prelegoj kun interesaj temoj, kursoj divers-nivelaj, libroservo kaj ekskursoj interalie al. Japana ĝardeno, *Hasselt's Modehuis*, biciklado tra la urbo, muziko kun Jonny M. kaj muzikateliero.



Reta Aliĝilo: <https://mallonge.net/bk2024a>. Retadreso: Limburg@esperanto.be
<https://benelukso.eu/kongreso>; <https://eventaservo.org/e/beneluksa2024>

LEA, Limburga Esperanto-Asocio: (<https://www.facebook.com/LimburgaEsperantoAsocio>)

Greziljono invitas vin al sia somera programo

- Junio 30 ĝis julio 05: La kvina [Verda Naturisma Semajno](#) kun [INOE](#)
- Julio -05 ĝis 15: La 8-a [Maratona Esperanto-kurso](#) kun *Ilona KOUTNY, Radojica Petrović kaj Andrea Bertrand*
- Julio 05 ĝis 15: La 36-a [Internacia E-Konferenco](#) post OSIEK pri variaj temoj
- Julio 15 ĝis 25: La dekaj [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj (francingve)
- Aŭg. 06 ĝis 16: 14-a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj kun *Mikaelo Bronštejn, Alex Humet, Larisa Osadčuk, Alain Delmotte*

- Aŭg. 10 ĝis 16: La tria [SOMERAS](#) kun *Danka Ley*, *Ankica Jagnjić*, *Jean-Luc Kristos*

Bonvenon en via Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono, F-49150 Baugé
1310 route du Lude, Grésillon, Saint Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé en Anjou –
Retpoŝte: kastelo@gresillon.org: Retejo: gresillon.org

Aliĝoj al Aruŝa bone progresas

En la 17-a de majo aliĝoj por la UK en Aruŝa kreskis ĝis 467 personoj el 57 landoj: Germanio 48, Francio 42, Italio 30, Ĉinio 26, Koreio 26, Japanio 25, Usono 24, Pollando 17, Belgio 17, Tanzanio 16, Brazilo 16, Kongo DR 15, Burundo `14, Britio 13 kaj Hispanio 12. La lastatempaj kreskoj okazis ĉefe en afrikaj landoj, eble pro la kampanjo de TEJO. La oficiala flugkompanio de la kongreso estas *Ethiopian*. La ekskurso grimpado al monto Kilimanĝaro estas organizita sole de LKK kaj ne apartenas al la kongresa laboro de UEA por la kongreso.

Ekzamena rekono de ALTE (ne desube)

Reprezentantoj de UEA sukcese prezentis la ekzamensistemon de UEA kaj la novan ekzamenretejon de edukado.net dum la 60-a ALTE-konferenco en Bad Homburg, Germanio, frue en aprilo 2024. La fakto, ke fakuloj de la Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo kaj kunlaborantoj de universitatoj, institutoj kaj ekzamen-centroj interesiĝis pri la laboro kaj atingajoj de esperantistoj estas granda honorigo kaj apreco. Legu pli ĉe edukado.net. <https://edukado.net/novajhoj?id=905>

Printempa ondo

Aperis la demonstra versio de la marta (printempa) eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 41-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava kaj ampleksa 132-paĝa 319-a eldono de *La Ondo*, dissendita al la abonantoj antaŭ kvin semajnoj. Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2024: <https://sezonoj.ru/2024/05/ondo-127/>

Sociaj retejoj en la fokuso

Jen ligilo pri la evento *sociaj retejoj* kaj eventaservo.org kun Debora Rossetti, Yves Nevelsteen kaj Laura Brazzabeni. https://youtu.be/Ur4sO_Q5fIA?si=E-Yi3nxuVNSHlqvY

Pionira poetino en la memoroj

Antaŭ cent jaroj, la 7-an de majo 1924, naskiĝis Marjorie Boulton, angla instruistino kaj Esperanto-poetino. Okaze de ŝia jubileo *La Ondo de Esperanto* proponas (re)legi kelkajn ŝiajn poemojn, kiuj aperis en *Baza Literatura Krestomatio*: <https://sezonoj.ru/2024/05/boulton-3/>

Generacia ŝanĝo en Bosnio-Hercegovino

La Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino trapasas generacian ŝanĝon. Membroj, kiuj dum jaroj surportis la plej grandan respondecon por la organizo, rezignis siajn postenojn favore al pli junaj membroj. Nia organizo havas bonajn

antaŭkondiĉojn por disvolvi siajn agadojn (ni havas niajn proprajn oficejojn), kaj ni klopodas nuntempe kandidatiĝi por publikaj alvokoj por financado de la agadoj kaj projektoj de la civitaj organizaĵoj.

En la venonta periodo, ni intencas komenci Esperanto-kurson por junaj studentoj, kun la celo renovigi kaj rejunigi la membraron. Ni ĝuas pozitivan bildon en la publiko kaj aliron al publikaj amaskomunikiloj.

La nuna defio estas sekurigi financadon je minimumaj kostoj de la oficejo, kiuj estas proksimume € 1000 jare. Kiam ni sukcesos ricevi financan subtenon por agadoj kaj kiam ni sukcese organizos kurson por komencantoj, ni havos bezonon de pli intensa internacia kunlaboro kun aliaj organizoj, partopreno en junularaj renkontiĝoj, kaj organizo de internaciaj renkontiĝoj kaj aranĝoj en Bosnio kaj Hercegovino.

Edin Colic Sekretario

“Mi estas tiu kuranta kun ŝafoj...”

de la galega poetino Chus Pato en traduko kaj deklamo de Suso Moinhos

<https://youtu.be/D2eVx0MfjnM>

<Landa Parad’> prezentas la regionon MONA

La regiono MONA kovras la Mez-Orienton kaj Nord-Afrikon, kie Esperanto nemulte rolas. <Landa Parad’> prezentas ampleksajn informojn pri la landoj de la mondo, ĉar por progresi ni devas scii nian nunan staton. La dokumentojn subtenas ILEI, IFEF kaj IKEF. Jam vi ricevis la regionon *Pacifiko* (AU, NZ, CA, MX kaj US). Ni alkroĉas la sveltigitan MONA-dokumenton (799 KB).

===== vortoj: 1115 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de



TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

Aperis jam EKO 2024 numeroj unu ĝis dek. Baldaŭaperos ankaŭ 11-20

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigok, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo0 vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.